nia voĉo

madrida esperanto-liceo januaro 2019

## CELEBRADO DE LA ZAMENHOF-TAGO

Kiel ni jam anoncis, la 15-an de decembro, MEL celebris la Internacian Tagon de Esperanto en la kultura centro Centro Sociocultural Mariano Muñoz, en la kvartalo Pradolongo-Usera. Ĉeestis ĉ. 25 homoj, kiuj ĝuis riĉan kulturan programon dum la fino de la mateno kaj komenco de la vespero.

Post bonveno kaj inaŭguro, ĉeestantoj kunmemoris la 70an datrevenon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj per laŭtlego de kelkaj artikoloj. Tuj poste partoprenis anoj de la Asocio de Idoj de la Hispana Ekzilo, kaj unu el ili donacis al Hispana Esperanto-Federacio kelkajn memoraĵojn de sia patro, Valentín Ladrero, kiu estis unu el la fondintoj de la asocio, aktiva dum la 1950aj jaroj, inter ili diversajn librojn kaj la membrokarton de HEF.

Krom diversaj prelegoj, oni poste celebris la libron en Esperanto per prezentado de libroj verkitaj aŭ tradukitaj de Miguel Fernández kaj la ĝuo de riĉa libroservo.

## AMPLEKSIGITA LA EKSPOZICIO EN FUENLABRADO



La ekspozicio pri Esperanto, kiu estis muntita la 15-an de decembro okaze de la Esperanto-Tago en la Junta de Distrito (municipa oficejo) de la kvartalo Loranca en Fuenlabrado, estos montrita ĝis la 8a de januaro, plilongigante la periodon unue fiksitan.

Ĝi estis formale inaŭgurita la 17-an de decembro, per prelego de José Antonio del Barrio, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, kun enkonduko de Isidoro Ortega, prezidanto de la loka grupo Fuenlabrada Esperanto-Ligo, kaj de Carmen Seco, magistratano-prezidanto de la distrikto.

## BLOGO PRI MADRIDA AGADO

Juna studento de magistra kurso pri Multmedia Ĵurnalismo en la Madrida Universitato Complutense, Patricia Merello, kreis multmedian projekton pri Esperanto, kiel baza parto de sia akademia aktivado, kun la titolo "El sueño de Zamenhof" (La revo de Zamenhof).

El sueño de Zamenhof

Temas ĉefe pri blogo https://lalenguadezamenhof.wordpress.com/, kiu celas montri la ĉefajn kulturajn esperantistajn agadojn kreitajn en Madrido, plus diversajn aspektojn de la historio de la lingvo en Hispanio. Ĝi estas redaktata en la hispana lingvo, kun multmedia karaktero, uzante videon, tekstojn, aŭ materialon, bildojn aŭ hiperligilojn. Krome, la projekto estas disvastigita pere de la sociaj retoj, Twitter kaj Facebook.

## JANUARAJ RENKONTOJ

La sabata renkontiĝo okazos ĉifoje la 12-an de januaro, je la 5-a vespere, en kafejo de MediaLab Prado.

La 14-an de januaro okazos nova literatura vespero, dum kiu ĉeestontoj legos teatraĵojn. Bona maniero amuziĝi kaj praktiki la lingvon.

## NOVAJ KURSOJ EN LA SIDEJO

Plu daŭras la kurso por komencantoj kiun gvidas Pedro Hernández la sabatojn matene. La klasoj revenos la 12an. Krome, la 21an de januaro komenciĝos nova kurso por progresantoj, kiun gvidos Andy Hernández. En tiu ĉi kazo la klasoj disvolviĝos ĉiulunde vespere, dum du monatoj. Atentu ke necesas havi jam iujn konojn de Esperanto, kaj ke oni kontrolos tion en la unua tago. Por aliĝo aŭ demandoj, kontaktu rekte kun Andy ĉe andyflorida@hotmail.es.

## VIZITIS NIN



Dum la unuaj tagoj de decembro vizitis nin la zorgantoj de la retradio Varsovia Vento (https://www.podkasto.net/), Irek Bobrzak kaj Agnieszka Mozer, kaj nia kantabra amiko Miguel Gutiérrez Adúriz. Krom diversajn renkontiĝojn kun membroj de la Ibera Skolo, kie ili registris intervjuojn por la podkasto, ili ĉiuj ĉeestis la unuasabatan renkontiĝon, la 1an de decembro, en la kafejo de MediaLab Prado (vidu apudan foton)

## ANONCO DE KUNVENO DE MADRIDA E-LICEO

La 28-an de januaro okazos Ĝenerala Kunveno de Madrida Esperanto-Liceo. Se vi estas membro de la asocio, vi baldaŭ ricevos la formalan kunvokon, kun la tagordo. Se vi ankoraŭ ne estas membro, memoru ke vi estas tre bonvena aliĝi. La kotizo estas nur 12 eŭroj jare. La aliĝilon vi trovos en la fako "dokumentoj" de la retejo de MEL http://esperanto.es/mel/, kaj vi povas profiti ankaŭ iun ajn viziton al la klubejo.

## PLILONGIGITA LA UNUA ALIĜPERIODO DE LA HISPANA KONGRESO

Memoru ke la Hispana Kongreso de Esperanto okazos ĉijare en la ponto de la 1a de majo, en Malago, kune kun la Andaluza Kongreso, kaj parte koincide kun la kongreso de la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj (IFEF). La unua aliĝperiodo finiĝis la 31an de decembro, sed pro la festoj ĝi estis plilongigita ĝis la 15a de januaro.

Profitu la okazon por pli favorpreza aliĝo. La detaloj kaj la aliĝilo estas troveblaj en la adreso http://esperanto-andalucia.info/, kaj vi povas skribi al kongreso@esperanto.es se vi havas dubojn aŭ deziras pliajn detalojn.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

Kutimaj ĉiusemajnaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com